

lingvoj interesiĝas pri Esperanto; en Benino kaj en Senegalo mi povis rilati kun kelkaj el ili tre fruktodone.

Malfermitaj homoj, ie en la mondo, ŝatas havi kontaktojn kun aliaj personoj en aliaj regionoj. Afrikanoj povas iri al retkafejo kaj skribi retmesaĝojn, uzi skajpon. Do Esperanto ebligas al ili esti en kontakto kun la mondo, eĉ sen vojaĝoj. Foje ili verkas tekstojn, artikolojn, novelojn, librojn, kaj povas diskonigi ilin tra nia movado, ili konigas Afrikon al la tuta mondo. Tiuj malfermitaj afrikanoj ankaŭ estas sindonemaj kaj malavaraj, kaj kelkaj el ili prizorgas infanojn, georfojn; pluraj el

ili mastrumas orfejojn en sia vilaĝo, urbeto, urbego. Ni en la nordo ricevas petojn pri helpo kaj pluraj el ni donas tian helpon. Tio estas bela faceto de nia movado. Tiaj helpoj, ĉu ene de nia movado ĉu ekstere, estas giganta subteno al la afrika kontinento.

Elstara programo inter la nordo kaj la sudo estas *Esperanto Plus*.

Ni en la nordo povas akiri raportojn ekzemple pri la situacio en orienta DR Kongo per la okuloj de niaj samideanoj tie. Tio estas pluso por ni ĉiuj.

Vidu plurajn informojn pri Esperanto en Afriko rete:



Kotonou, Benino

Esperanto-asocioj en Afriko en la retejo de UEA – <https://uea.org/landoj/afriko>

Esperanto en Afriko kaj ĝiaj bultenoj rete – <https://www.esperanto-afriko.org/>

Fotoj pri Afriko ĉe Edukado.net – <https://edukado.net/biblioteko/fotoj?al=36>

UEA

Fotokonkurso Vikio amas ZEO-jn

Juan Sebastian Quintero Santacruz, la ĉeforganizanto de VAZ, kaj Fernando Maia Jr., UEA-estrarano pri Kulturo

Fotokonkurso *Vikio amas ZEO-jn* kaj *Premio Kvinpinta Stelo*: ni volas komuniki pri la rezultoj de Esperanto-kultura konkurso sponsorita de UEA. Kadre de la Jaro de la Esperanta Kulturo UEA sponsoris la fotokonkurson *Vikio Amas ZEO-jn* (VAZ) per starigo de la *Premio Kvinpinta Stelo* (KPS). La konkurso, organizita de la grupo *Esperanto kaj Libera Scio* (ELiSo), la aktivarulo nuntempe respondeca pri la Esperanto-versio de Vikipedio, alvokis la komunumon kundividi fotojn pri ZEO-j tra la mondo per disponigo sub permesilo *Creative Commons* por libera uzo, i.a. en Vikipedio. La plej bonaj fotoj ricevas rekompencojn ĝis 150 usonaj dolaroj laŭ diversaj kategorioj, sponsoritaj de ELiSo. Paralele PKS premias po ĝis 5 fotojn por ĉiu kontinento, kun rekompencoj ĝis 25 eŭroj, uzablaj en la libroservo de UEA. VAZ sukcesis atingi la markon de 209 fotoj danke al 20 partoprenintoj el Aŭstrio, Germanio, Brazilo, Hungario, Sudafriko, Hispanio, Bulgario, Francio, Svedio, Nederlando, Belgio, Finnlando, Pollando, Kroatio, Italio, Ĉeĥio, Rumanio, Litovio kaj Portugalio. La plej bona foto estis de Litovio, la monumento “Zamenhof leganta libron”. Versio de la sama monumento ri-



Aŭtoro de la premiita foto: la uzanto Fotanto. Foto uzblas laŭ la permesilo *Creative Commons By-Sa 4.0*.

cevis la duan premion. La tria estis por “Monumento al Esperanto”, en Aŭstrio. Michal Matúšov ricevis la Premion de la Publika por foto de la varsovia prunedona bicikla sistemo “Veturilo”, el Pollando. Ĉar ne alvenis fotoj el ĉiuj kontinentoj, PKS premiis 5 fotojn el Eŭropo kaj 1 por Ameriko (Brazilo). La premiojn aljuĝis Nicolas Maia el Brazilo, Ivan Camilo Quintero kaj Juan Sebastian Quintero el Kolombio, memspertaj vikimedianoj kaj esperantistoj. Bedaŭrinde la kontribuoj de Sudafriko ne estis klasigeblaj kiel ZEO-j. Ĉi tiu, la 1-a VAZ, estis eksperimenta, sed certe atingis sian celon videbligi Esperantajn heredaĵojn tra la mondo: ZEO-j neniam

antaŭe registritaj nun aperas en la mapo danke al la laboro de ELiSo, kiun UEA varme gratulas. Venontjare ELiSo esperas ricevi fotojn el Afriko, Azio kaj Oceanio. Detalojn pri la premio legeblas ĉe: https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Wiki_Loves_ZEOs_2018/eo.

La premiitaj fotoj videblas ĉe: https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Wiki_Loves_ZEOs_2018/Winners.

Fine gravas diri, ke danke al malavaraj donacoj de esperantistoj al Fondaĵo *Kultura Evoluigo* de UEA, kiu akiris por tiu celo 290 eŭrojn, PKS ne pezis al la buĝeto de la Asocio. UEA kore dankas ankaŭ al tiuj homoj, amikoj de la Esperanta kulturo.